**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 41

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Riĉeco sen gvido kiel ĉevalo sen **␣ r ␣ d ␣**.

**2.** Temas ekzemple pri la protein-dieto (kaj pri la troa manĝado de viando, ĝenerale), ĉar niaj hepato kaj renoj ne povas facile **␣ ␣ g ␣ st ␣** multajn proteinojn.

**3.** Sur la supro de la pordego oni vidis la **␣ ns ␣ gn ␣ ␣** aŭ la simbolon de l' ŝtato: globon kun flugiloj, de post kiu elrigardis du serpentoj.

**4.** Tio estis strangaj pilgrimoj: ili portis grandegajn **␣ ␣ k ␣ d ␣ ␣ ␣** de freŝaj floroj en la manoj kaj en sakoj katojn, mortintajn dum la tuta jaro.

**5.** Avery studis pneŭmokokojn – **␣ ␣ kt ␣ r ␣ ␣ ␣ ␣**, kiuj, inter aliaj aferoj, respondecas pri pneŭmonio en homoj.

**6.** La trafiko en la stratoj malpli viglis, kaj laŭ Blagovest oni pli bezonis taksion nokte, kiam la **␣ r ␣ m ␣ ␣** kaj busoj ne trafikis.

**7.** Apude estas arbaro, kie eblas trovi kaj pluki bongustajn **␣ ␣ rt ␣ l ␣ ␣ ␣** kaj diversajn fungojn.

**8.** Fariĝas pli oftaj la aparatetoj flugantaj sub la ĉielo, ĉar tia telestirata aviadileto kapablas plenumi diversajn taskojn, ĉu por **␣ ␣v␣ l ␣** uzado, ĉu por militaj celoj.

**9.** Vapormaŝinoj, fervojoj, radioaparatoj estis **␣ nv ␣ nt ␣ t ␣ ␣** ene de ducento da jaroj, do dum mikroskopa parto de unu miliono da jaroj.

**10.** Post la glacia epoko en Kvarken restis specoj de plantoj kaj bestoj, kiuj troveblas en neniu alia loko, nun ili **r ␣ fl ␣ kt ␣ ␣** la procezon de glaciiĝo, degelo, kaj la ŝanĝiĝantajn akvonivelojn.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Multnaciaj firmaoj kaj riĉegaj individuoj sukcesas tute ne, aŭ apenaŭ, pagi impostojn, uzante la financajn servojn disponigatajn en fiskaj **p ␣ r ␣ d ␣ z ␣ ␣**.

**2.** De pluraj jardekoj, kultivistoj uzis insekticidan toksinon produktitan de bakterio Bacillus thuringiensis kontraŭ moteoj kaj **p ␣ p ␣ l ␣ ␣ ␣**.

**3.** Ĉirkaŭ 70 procentojn de **m ␣ ␣ z ␣**, plej grava greno por nutri zimbabvanojn, kultivas nigruloj sur malfekundaj terenoj, kiujn lasis al ili la blankuloj.

**4.** La **n ␣ jt ␣ ␣ g ␣ l ␣** kantas belege, kaj la kardelo ĝin imitas.

**5.** Ekzemplo de kruelaĵo okazis al iu pograndisto, kiu prenis **kr** ␣ **d** ␣ **t** ␣ ␣ ĉe fama financa institucio antaŭ du jaroj.

**6.** Laŭ mia scio komunismo estas depratempa revo de la homaro pri la justa komunumo, kie inter la homoj regas frateco kaj justeco kaj inter la popoloj **k** ␣ **nk** ␣ ␣ **d** ␣ kaj paco.

**7.** La maljunulo leviĝis de la benko kaj iris al la lageto de la ĝardeno, apud kiu staris **l** ␣ **ŭ**␣ ␣ perfekte kovrita de grimpantaj kreskaĵoj.

**8.** Ĉiu komunumo havas sian sistemon por kolekti rubaĵojn, ekz. blanka sako aŭ kelkloke arĝentkolora ujo entenas **k** ␣ **rt** ␣ **n** ␣ ␣ aŭ plaston.

**9.** Se legado de surekranaj tekstoj lacigas vin, pripensendas aĉeto de pli bona **e** ␣ **r** ␣ **n** ␣ anstataŭ malŝparo de papero.

**10.** Sporto jam delonge (eble ĉiam) havas ankaŭ komercan **d** ␣ **m** ␣ **ns** ␣ ␣ ␣, sed lastatempe, laŭ mia impreso, ĝi degeneris komplete al nura varo.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| kompetent', konfidenc', ĝerm', human', medicin', fe', orkestr', ŝpruc', glav', kompon'. |
|---|

**1.** La bonaj ␣ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ de la vivo, ĉiuj alportis al la ĵusnaskito siajn donojn.

**2.** Sur la deklivo de monteto laboris kelke da homoj, ili ĉerpis la akvon per kruĉoj kaj surverŝis bedojn de legomoj aŭ per ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **g** ␣ **l** ␣ ␣ malsekigis la arbojn.

**3.** Joab havis sur si striktan veston, kaj sur ĝi estis zonita glavo, kiu pendis en la ␣ **l** ␣ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ ĉe lia lumbo kaj facile povis eliri kaj eniri.

**4.** Lingvo Esperanto ekde la apero fariĝis rimedo unuiganta homojn, kaj tio estas la plej taŭga komprenigo de ␣ ␣ **m** ␣ ␣ ␣ **s** ␣ ␣ ␣ ideoj de doktoro Zamenhof.

**5.** La vegetalaj oleoj estas produktataj de la plantoj dum senpluvaj periodoj por malplirapidigi la seman ␣ ␣ ␣ **m** ␣ **d** ␣ ␣.

**6.** Iuj rimarkigis, ke Beethoven, kiam li surdiĝis, ankoraŭ kapablis senti siajn ␣ ␣ ␣ **p** ␣ ␣ ␣ **ĵ** ␣ ␣ ␣ kaj komponi en la kapo.

**7.** Kalocsay estis eminenta ␣ ␣ ␣ ␣ **c** ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣, sed ni havas de li neniun libron pri kuracado.

**8.** La geedza paro transloĝiĝis al Berlino, kie Schoenberg du jarojn vivtenis sin kaj sian familion per ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ **d** ␣ de operetoj kaj estrado de kabareta orkestro.

**9.** Tradukintoj devus multe pli profunde studi la lingvon, detale analizante la multajn verkojn en esperanto el la hispana kaj kataluna lingvoj, kaj peti reviziojn de ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣.

**10.** Tuj post sia enoficiĝo, Abe nomumis ␣ ␣ ␣ **f** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ direktoro de la Japana Banko, la centra banko, kaj prezidanto de la Japana Elsenda Korporacio, la duonŝtata radio-televido.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** La arto de Nikolaj Roerich allogas per siaj poezieco kaj simboleco, li certigis en la arto ___ kaj belecon, ne viditan en la tiama socio.

**a.** harmonion **b.** glavon **c.** profeton **d.** abrikoton

**2.** La ĉeftemon oni pritraktis de diversaj religiaj kaj filozofiaj vidpunktoj, okazis ___ testoj kaj laborgrupoj.

**a.** vantaj **b.** bambuaj **c.** rimenaj **d.** psikologiaj

**3.** La ___ ĉe la granda horloĝo iradis tien kaj reen, la montriloj rondiradis, kaj ĉio en la ĉambro maljuniĝadis ĉiam pli kaj pli.

**a.** inspektoro **b.** laĉo **c.** pendolo **d.** akno

**4.** La deviga, laŭleĝa uzo de sekur-zono en aŭtomobilo apartenas al kolektiva ___, ĝi estas tipa ekzemplo de atenco kontraŭ la minimuma individua libero.

**a.** akso **b.** psikozo **c.** tarifo **d.** porcelano

**5.** Ĉie en la arbaroj, ___, kampoj kaj ĝardenoj milionoj da forĵetitaj plastaj sakoj kaj membranoj flirtas en la vento kaj kuŝas sur la tero.

**a.** heĝoj **b.** mineraloj **c.** portretoj **d.** ampoloj

**6.** En la malvasta ___ brulas lumo, kaj apud la tablo, kovrita de geografiaj kartoj, sidas en profunda meditado la granda admiralo de Hispanujo, Kristoforo Kolumbo.

**a.** ruino **b.** banano **c.** monumento **d.** kajuto

**7.** La okcidentaj landoj, kiuj intense ___ profundigi la ekonomiajn rilatojn kun Sudorient-Eŭropo, nun profitas la altan dinamikon ekonomian de la regiono.

**a.** inundis **b.** klopodis **c.** bindis **d.** indignis

**8.** Plenkreskuloj kartludis kaj gustumis veran ukrainan ___ kun lardo kaj sekala pano.

**a.** minimumon **b.** tapeton **c.** brandon **d.** vulturon

**9.** Por kalkuli la malnetan enlandan produkton oni adicias nur la valorojn de la konsumado, la investovaroj kaj la eksporto, kaj de tio oni ___ la importon.

**a.** mencias **b.** subtrahas **c.** flustras **d.** revizias

**10.** Lastatempe ŝajnas, ke la tero mem povas havi unu aŭ plure da ___ en neforaj regionoj de la kosmo.

**a.** ĝemeloj **b.** limakoj **c.** kanaloj **d.** glavoj